

“OSCAR ROMERO, BILDO KAJ SIMBOLO PRI LA MARTIROJ PRO JUSTECO KAJ VERO”

Romo, vendredon la 25an de marto 2011, 19^o horo

STULTECO (KAJ SENPOVECO) DE LA POVO

Johano la Baptisto estis nek prudenta nek diplomata.

Antaŭ la situacio kiu ekestadis en Galileo, kun reĝo Herodo kiu prenis kiel edzinon la edzinon de Filipo, sia frato, tiel malobeante kaj al la dia Leĝo (Lv 18,16) kaj al la moralo, Johano estus povinta “samtempigi” la malobeon de la reĝo kaj ĝin meti ene de la reĝaj prerogativoj kaj privilegioj.

Aŭ, kaj estintus la plej bona solvo, li estus povinta eltiriĝi el la demando, kiu finfine ne koncernis lin, kaj li estus povinta diri ke al li interesas kiel la reĝo regas, kaj ne lia privata vivo. Se li bone regadis, se li respektadis kaj rekonadis la privilegiojn de la pastra kasto, poste en sia reĝejo li povis kondukti laŭ sia volo, organizante, por la amuzo lia kaj de la korteganoj, ankaŭ festenojn dum kiuj montri al samtabloj neplenaĝulinon (la filinon de Herodias) danci (Mk 6,22). Gravas ke la reĝo bone regu.

Kaj la Baptisto estus savinta sian kapon.

Male, Johano, malcedema kaj obstina, insistadis denunci Herodon: “Ne licas al vi teni la edzinon de via frato” (Mk 6,18).

Neniam oni denuncu potenculon.

La invitoj ŝanĝi ne lin atingas, neniam li pensos konvertiĝi. La povo reagis en la ununura maniero por ĝi taŭga, pere de brutaleco kaj perforto.

Tiel Herodo opiniis definitive silentigi la voĉon de Johano, kaj tiun de sia konscienco, fortranĉante la kapon al la Baptisto.

Kaj tiel li faris.

Tio estas la stulteco kaj la senpoveco de la povo.

La povo, ekde ĉiam, opinias silentigi la voĉojn de malkonsento ilin estingante, eliminante, kiam eblas ankaŭ fizike, la voĉon kaj la personon de tiu kiu kuraĝas en ĉiu epoko, kriadi “Tio ne licas al vi!”.

Sed la vivo plifortas ol la morto, samkiel la lumo plipotencas ol la mallumo. Pro tio la vero ĉiam antaŭeniras kaj supervenkas la mensogon, ankaŭ kiam tiu mensogo estas trudita kiel oficiala vero.

Definitive silentiginte la profeton, Herodo opiniis dormi senzorgan dormon. Male li estas atakata de inkubsonĝoj kaj fantomoj, ĉar la voĉo kiun li kredis silentigita, nun resonadas pli potenca ol iam ajn en Jesuo, en kiu la reĝo, en sia obsedado, opinias rekoni la Baptiston: “Tiu Johano, kiun mi senkapigis, resurektis!” (Mk 6,16). Iu Baptisto multe pli potenca ol tiu kiun li murdigis, ĉar Jesuo “havas la povon plenumi miraklojn” (Mt 14,2), kapablo kiu malestis en Johano.

Tiu estas la stulteco kaj la senpoveco de la povo: ĝi ne scias ke kiam ĝi sufokas voĉon, la Sinjoro naskas alian pli potencon ol tiu silentigita.

Sed la potenculoj estas stultaj (“Senscienco estas metata tre alte”, Predikanto 10,6). La stultulo en la Biblio ne estas tiu kiu estas trafita de mensa malsufiĉo, sed tiu kiu zorgas nure pri sia tuja profito (Lk 12,20; Mk 7,22), kiu estas ĝuste la karakterizo de la potenculoj, kiuj, kiel denuncas profeto Jesaja, estas “hundoj avidaj, kiuj ne povas satiĝi, estas la paŝtistoj kiuj komprenas nenion. Ĉiu iras sian vojon, ĉiu serĉas sian profiton, seneksepte” Jes 56,11).

Pro tio la stulteco puŝas la potenculojn fiplenumi la eraron elimini ĉiun voĉon kiu estas al ili kontraŭa aŭ kiu denuncas ilian konduton. Stulteco kiu igas ilin pli danĝeraj ol la fiuloj. La fiuloj povas ĉiam iĝi bonaj, la stultuloj restas tiaj porĉiame.

Kaj la stulteco de la povo videbliĝos ankaŭ en la konduto de Kajfo, la ĉefpastro.

La havanto de la plej alta spirita ofico pensos, eliminante Jesuon, forigi definitive ĉiun danĝeron por la religia institucio, krizigita de la instruado kaj de la vivo de la homo el Nazareto.

La denunco de Jesuo rilate la religiajn aŭtoritatojn estas fakte eĉ pli grava ol tiu de Johano al Herodo.

La Baptisto akuzadis la reĝon pri kontraŭleĝa konduto.

Jesuo akuzas la religiajn estrojn esti murdantoj kaj mensoguloj samkiel ilia patro, la diablo: “Vi havas kiel patron la diablon, kaj vi volas plenumi la dezirojn de via patro. Li estis murdinto ekde la komenco kaj ne persistadis en la vero, ĉar ne estas vero en li. Kiam li parolas mensogon, parolas pri sia propraĵo, ĉar li estas mensoganto kaj patro de la mensogo” (Jo 8,44).

Laŭ Jesuo la religiaj aŭtoritatoj estas kiel ilia patro, la diablo, trompistoj kaj murdistoj, ĉar ekde ĉiam ili oferis la homojn al propra intereso, al propra honoro, al propra prestiĝo kaj, des pli grave, ili kaŝis sian intereson per la doktrino.

Samkiel la antikva serpento, la religiaj aŭtoritatoj promesas vivon (“Ne, vi ne mortos!”, Gen 3,4), kaj male ili kaŭzas morton, trudante kiel Dian volon tiun kiu reale estas nur mensogo por kaŝi iliajn interesojn. Tiel la aŭtoritatoj sufokas la deziron de pleneco je vivo kiun ĉiu homo havas en sia eno, malebligante la realigon de la Dia projekto pri la homaro.

La denunco de Jesuo estas grava: la religia sistemo, kiu pretendas regi la popolon en la nomo de Dio, estas nenio alia ol mensogo kaj establita krimo (Jo 10,1). Ĉiuj tiuj kiuj identiĝas kun tiu institucio iĝas kunkulpuloj de tiu mortiga trompo.

Tio estas tro.

Kaj Kajfo decidas ke alvenis la momento mortigi Jesuon. Al la religiaj estroj la fakto ke Jesuo estas la Mesio, la Filo de Dio, ne gravas.

Alia estas ilia dio.

La diaĵo al kiu ili prostituigis nomiĝas mamono, tio estas la avantaĝo. Ĉio kion la religiaj aŭtoritatoj faras kaj diras estas ligita al ilia profito, pro tio ili kapabas “la malbonon nomi bono kaj la bonon malbono, kaj mallumon faras lumo kaj la lumon mallumo, kaj maldolĉon faras dolĉo kaj la dolĉon maldolĉo!” (Jes 5,20).

Ĉio estas ligita al profito, sendepende ĉu tio iĝos bono aŭ malbono por la homo. Se iu agado, eĉ krima, portas al ili avantaĝon, oni ĝin faras. Kaj Kajfo por konvinki la Sinedrion elimini Jesuon utiligas la nepran sekuran esprimon: “tio konvenas al ni...” (Jo 11,50).

Jesuo ne mortis ĉar tio estis la volo de Dio, sed ĉar tio konvenis al la pastra kasto kiu havis la povon: “Do, lin ni mortigu kaj ni havos lian heredaĵon!” (Mt 21,38).

Kaj ili mortigas Kriston.

Stulteco kaj senpoveco de la povo.

Ili pensis ke ili definitive sufokis la voĉon de Kristo kaj detruis lian mesaĝon, male ĝin ili amplifikis.

La morto de Jesuo, fakte, multobligis kaj potencigis des pli lian ĉeeston kaj lian voĉon, kaj la resurektinta Kristo subtenis kaj fortigadis siajn disĉiplojn, kiel legeblas en la fino de la evangelio laŭ Marko: “la Sinjoro agadis kune kun ili kaj konfirmadis la Vorton per la signoj kiuj ĝin akompanadis” (Mk 16,20). Se dumvive Jesuo estis limigita de sia homa kondiĉo kiu ne permesis al li esti ĉie, per lia morto lia Spirito, potenco kaj krea energio de Dio, elverŝiĝis ĉien.

Fronte al la nehaltigebla disverŝiĝo de la predikado de la apostoloj, estos senutilaj minacoj kaj malpermesoj, kiel devos konstati ĉagrenitaj la ĉefpastro kaj la tuta sinedrio: “Ni klare ordonis al vi ne plu instrui en la nomo de tiu, kaj jen vi plenigis Jerusalemon per via doktrino” (Ag 5,28).

Je tiu ĉi punkto la povo povus ŝanĝi strategion. Konsiderante ke minacoj kaj murdoj estas senutilaj, kaj anstataŭ haltigi la fenomenon ĝi tiun potencigas, oni devus utiligi aliajn taktikojn de subpremado.

Ne eblas.

Ne eblas ĉar la povo estas stulta, kaj la stultulo neniam korektas sian konduton, ankaŭ se finfine ĝi kaŭzas lian damaĝon (“Samkiel la hundo revenas al sia vomaĵo, tiel la stultulo refaras siajn stultaĵojn”, Pr 26,11). Kaj li daŭre plenumadas sian agadon de subpremado kaj mortigo, sed je propra damaĝo, fortigante tion kion oni volas elimini, ĉar, kiel respondis Jesuo al la fariseoj kiuj volis silentigi liajn disĉiplojn, “Se tiuj silentos, kriados la ŝtonoj” (Lk 19,40). La forto de la vivo kaj de la vero sukcesas ĉiukaze progresi kaj flori en novaj, diversaj, nekonataj formoj. Estas bankrotige

kontraŭstari la vivon. Estas kiel se la tenebro volus kontraŭstari la lumon: tiu ĉiam superregos (Jo 1,5).

Pro tio, skribas la psalmisto, antaŭ la intrigoj kaj la komplotoj de la potenculoj, la Sinjoro ridas: “Ridas tiu kiu estas en la ĉielo, la Sinjoro primokas ilin” (Psa 2,4).

Sed la potenculoj ne ŝanĝiĝas “obstinaj kaj necirkumciditaj en la koro kaj en la oreloj”, ili oponas “ĉiam reziston al Sankta Spirito” (Ag 7,51), kiel denuncos Stefano, la unua disĉiplo de Jesuo kiu estos murdita. Li homo de la Spirito, denuncos la estrojn dirante: “Kiun el la profetoj viaj prapatroj ne persekutis? Ili mortigis tiujn kiuj antaŭanoncadis la alvenon de la Justulo, kies trompisto kaj mortigistoj vi nun iĝis, vi, kiu ricevis la Leĝon pere de la ordonoj donitaj de la anĝeloj kaj ne ĝin observis” (Ag 7,52-53).

Kaj ankaŭ Stefano estas murdita. Alia malkomforta voĉo, kiu kuraĝis denunci la templon kaj “renversi la kutimojn kiujn Moseo pludonis al ni” (Ag 6,14) estas forigita.

Stulteco kaj senpoveco de la povo.

Efiko de lia morto, kaj de la perforta persekutado kiu furiozas kontraŭ la eklezio de Jerusalemo, estos la dispelado en la regionojn de Judujo kaj Samario, kie la mesaĝo de la bona novaĝo, ĝis tiam enfermita ene de la muroj de Jerusalemo, disvastiĝos kaj multobliĝos (Ag 8).

Kaj se ĉivespere ni estas ĉi tie, 31 jarojn post la murdo de iu episkopo el Salvadoro, estas paradokse ĝuste “danke” al la stulteco kaj senpoveco de la povo, kiu daŭrigas persiste sufoki en la sangon ĉiun voĉon kontraŭan al mensogo trudata kiel vero.

Verŝajne se li ne estus estinta mortigita, la mesaĝo de Oscar Arnulfo Romero estus restinta limigita ene de lia Lando aŭ de Latinameriko. La tempo kaj la taktiko de la povohavantoj, kiu estas ĉiam kovri kaj kaŝi, “silentigi, tranĉadi... tranĉadi, silentigi” laŭ Manzoni-a memoro (La Gefianĉoj, ĉap. 19), iom post iom estus vualiginta lian bildon kaj haltiginta lian mesaĝon.

Male, episkopo Romero, lia vivo kaj li mesaĝo iĝis universalaj kaj riĉaĝo de la tuta Eklezio kaj de la homaro, ĉar, kiel bone intuciis Romero en iu el liaj lastaj intervenoj, “Preter la tragedioj, la sango kaj la perfortoj, estas iu vorto de fido kaj de espero kiu diras al ni: estas elirvojo.... Ni kristanoj posedas unikan forton”. La forto de Tiu, kiu, kelkajn minutojn antaŭ la aresto kaj la mortigo, deklaris al la siaj: “Kuraĝon, mi venkis la mondon!” (Jo 16,33). Ĝi ne estas promeso por la estonto (venkos), sed konstato en la estanteo (venkis): Kiu sin metas flanke de la vivo ĉiam estos venkanto de la morto, kiu sin metas flanke de la vero ĉiam venkos la mensogon kaj kiu lasos sin gvidi de la lumo ĉiam venkos la mallumon.